fari pri tiu ĉi kreitaĵo, kiam mi rehejmiĝos" kiam denove ĝi gruntis, gruntis tiel forte kaj tiel *porke*, ke ŝi derigardis, mirigite, eĉ timigite, en ĝian vizaĝon. Oni jam ne povus dubi plu: jen porkido, vera porkido. Ŝi tuj sentis ke estus absurde porti ĝin plu.

Do ŝi mallevis la besteton, kaj vidis ĝin, tuj post la mallevo, fortroti trankvile en la arbaron. Kaj jen por Alicio granda senzorgigo, "ĉar" diris ŝi "kiam ĝi estos plukreskinta ĝi fariĝos terure malbela infano, kvankam nun, se oni nomos ĝin porko, ĝi tre bone aspektas."

Ŝi komencis pripensi aliajn infanojn de ŝi konatajn, kiuj pli bone taŭgus kiel porkoj kaj ĵus diras al si "se nur oni scius la metodon ŝanĝi ilin"—kiam subite ŝi eksaltas mirigite; jen, tutapude, sidas sur arbobranĉo la *Ĉeŝŝa* kato.

"Sinjoro *Ĉeŝŝa* kato"—Ŝi komencis malkuraĝe, ĉar ŝi ne povis konjekti ĉu ĝi ŝatus tiun formon, aŭ preferus "Via kata moŝto."

Tamen, ĉar ĝi nur grimacis pliamplekse, Alicio konkludis ke ĝis nun ĝi ne ofendiĝis. Ŝi do daŭrigis:—

"Ĉu vi afable diros al mi, mi petas, laŭ kiu direkto mi devas iri de tie ĉi?"

"Tio *iom* dependas de la loko kiun vi celas" diris la Kato.

"Ne tre grave al mi kien ——" komencis Alicio.



"Sekve, ne tre grave en kiu direkto vi iros" interrompis la Kato.

"Se nur *iun* lokon mi atingos" Alicio daŭrigis.

"Ho, iun aŭ alian vi nepre atingos" respondis la Kato "se nur sufiĉe longe vi marŝos."

Alicio konfesis en si ke *tion* oni ne povas nei. Do ŝi eksperimentis alian demandon:—"Kiaj personoj loĝas proksime de tie ĉi?"

"En tiu direkto" diris la Kato, ĉirkaŭsvingante la dekstran antaŭpiedon, "Ĉapelisto loĝas, kaj en jena (montrante per la alia) loĝas Martleporo.[1] Vi vizitu kiun ajn; ambaŭ estas frenezaj."

"Sed mi ne volas renkonti frenezulojn" diris Alicio.

"Ho, tion vi ne povas eviti" respondis la Kato "ĉe ni ĉiu estas freneza, senescepte. Mi estas freneza; ankaŭ vi!"

"Kiel vi scias ke mi estas freneza?" Alicio demandis.

"Nepre" diris la Kato "ĉar alie vi ne venus tien ĉi."

Ŝajnis al Alicio ke tio tute ne estas pruvo; tamen, preterlasante sin, ŝi demandis "kaj kiel vi scias ke vi estas mem freneza?"

"Por komenci" la Kato respondis "vi konsentas ke hundoj ne estas frenezaj?"

[1] "Same freneza kiel leporo en Marto" estas angla popoldiro.